# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Marto : 3 2022


## JUĜISTO BLOKAS *TELEGRAM* EN BRAZILO

Juĝisto de la Supera Kortumo de Brazilo ordonis, la pasintan vendredon, la blokon de la nuba tujmesaĝilo *Telegram*, pro la fakto, ke la respondeculoj de tiu kompanio ne kunlaboras kun la justico.

Dum la lastaj monatoj la prezidanto Jair Bolsonaro kaj kelkaj grupoj apogantaj lin ekuzis kaj instigis la uzon de ĉi tiu tujmesaĝilo. Ili forlasis aliajn servojn kaj sociajn retejojn, post la blokado de mesaĝoj de ili senditaj, kiuj estis taksataj kiel mensogaj aŭ ofendemaj.

Laŭ la juĝisto, la tujmesaĝilo *Telegram* estas konata pro sia ne-kunlaboremo kun tribunaloj aŭ policoj de aliaj landoj, kaj tio povus esti avantaĝo por ĉi tiu aplikaĵo, rilate aliajn komunikilojn. En kelkaj ŝtatoj *Telegram* jam estis blokita de antaŭ kelkaj jaroj, ekzemple en Rusio de 2018. Tiel, ĉi tiu tujkomunikilo alfrontis cenzuradon kaj blokojn en aliaj landoj pro la akuzo, ke ĝia servo estas uzata por faciligi kontraŭleĝajn agojn, ekzemple terorismon. *Telegram* ĉiam rifuzas postulojn de naciaj aŭtoritatuloj por aliri datumojn de uzantoj.

Tion mem elstaras la juĝisto, tiel li diras, ke *Telegram* funkcias sur grundo taŭga por la multobligo de enhavoj kiuj povus esti taksataj kiel krimoj.

La juĝisto ankaŭ diris, ke la justico, pere de la federala polico, klopodis kontakti multfoje kun reprezentantoj de *Telegram*, tamen ili ne sukcesis kaj tio povas esti konsiderata kiel ignoro al juĝaj mandatoj. Per *Telegram* uzantoj povas sendi voĉmesaĝojn kaj interŝanĝi bildojn, filmetojn kaj ĉiajn dosierojn. Laŭ informoj de la kompanio, ĉiumonate *Telegram* estas uzata de 500 milionoj da homoj.

# Vorto de la Semajno

**Ambasadoro:** Oficiala, plej alta reprezentanto, konstanta aŭ ne, de iu ŝtato ĉe alia, aŭ ĉe internacia organizaĵo.

**Ambasado:** Ambasadoro kaj ties kunlaborantoj.

**Ambasadejo:** Konstruaĵo, en kiu troviĝas ambasado.

**Ambasadorejo:** Rezidejo de ambasadoro, ĉi tiu loko povas koincidi, aŭ ne, kun la ambasadejo, kiu estas la loko kie oficas la ambasadoro.

**Ambasadoreco:** Rango aŭ ofico de ambasadoro.

Sinonimoj: *diplomato, sendito, konsulo, nuncio.*

Diferenco inter ambasadoro kaj konsulo:

Dum ambasadoro reprezentas eksterlande sian ŝtaton, konsulo estas diplomatia agento, komisiita protekti en eksterlando la aferojn de la samregnanoj.



Laŭ la internacia juro, ambasadejoj ĝuas eskterteritorian statuson, tio estas, kvankam ili estas en teritorio de la gastiganta lando, ili ne estas submetitaj al la loka juro, kaj en preskaŭ ĉiuj situacioj la konstruaĵoj estas traktataj kiel parto de la teritorio de la lando al kiu ili apartenas.

Internacia Jurista Esperanto-Asocio www.esperantojuro.org jurista@esperanto.ac